# Konferenco pri la estonteco de Europo: Tvitera kampanjo

Andreas Kück

2022-01-29

# Superrigardo

1) Iomete pri Tvitero
2) Kampanjado en Tvitero
3) Perceptita efiko
4) Jen kiel oni povas kunkampanji en Tvitero

# 1) Iomete pri Tvitero

- El kio konsistas la diferenco inter Fejsbuko kaj Tvitero?
  - En Fejsbuko oni renkontas homojn, kun kiuj oni vizitadis la saman lernejon.
  - En Tvitero oni renkontas homojn, kun kiuj oni shatus esti vizitadinta la saman lernejon.
- Sen Tvitero mi kredeble ne estus sciighinta pri la Konferenco pri la estonteco de Europo.



# 2) Kampanjado en Tvitero (1/3)

- Pri la EU-estontecokonferenco (#CoFoE) mi trovis jenan slovak-lingvan pepon A.
- En ghi estas menciataj Tviter-kontoj de kelke da estonteckonferencaj plen-kunsidanoj.
- Al pepo A mi afishis respondan pepon B.
- Ghin montras la sekva pagho.
- Tviter-kontoj menciataj en A kaj/au B estas sciigataj pri pepo B.
- Tio estas: Tiuj Tviter-kontoj ricevas apartan mesaghon, kiu atentigas pri pepo B.



# 2) Kampanjado en Tvitero (2/3)

- Jen pepo B:

← Tweet

Esperanto in Deutschland
@Esperanto_D

Antwort an @miroslavhajnos @NarodnyKonvent und 12 weitere Personen

Panel 1 - Session 2 - Report:
"We recommend promoting multilingualism at a very early age."
Propagujte myšlienku #CoFoE, ktorá má najväčšiu podporu:
"The EU needs improved language learning"
Základ: Úspešný a inovatívny program Erasmus+
@VladoBilcik
futureu.europa.eu/processes/Educ...

12:15 nachm. · 7. Dez. 2021 · Twitter Web App

Tweet-Aktivität anzeigen

1 Retweet 5 „Gefällt mir"-Angaben

La slovaka teksto signifas pli-malpli:
Bv subteni la plej popularan CoFoE-ideon:
[...]
Bazo: Sukcesa k noviga Erasmus+-programo.

# 2) Kampanjado en Tvitero (3/3)

- Ligilo https://mallonge.net/pepojcofoe1 kondukas al serio de chirkau 36 pepoj.
- Chiu el ili respondas – laustile de pepo B – al pri-estonteckonferenca pepo,
  - kiun afishis estonteckonferenca plenkunsidano au
  - kiu mencias ties Tviter-konton.
- Per chi tio estonteckonferencaj plenkunsidanoj estas aparte atentigitaj pri propono "The EU needs improved language learning".

# 3) Perceptita efiko

- Unu el tiuj alpepitaj anoj (nome @martin_klus) markis per shato koncernan pepon B afishitan de mi.
- Alian pepon de mi (tiuokaze en la finna) markis per shato persono (ne ano), kiu estas alpepita.
- Tviter-konto @EUinLesotho reklamis por la dirita propono:



# 4) Jen kiel oni povas kunkampanji en Tvitero

- Repepu kaj shatu la pepojn, al kiuj kondukas https://mallonge.net/pepojcofoe1.
- Pri por-Esperantaj proponoj afishu mem per viaj propraj pepoj; uzu almenau #CoFoE, kiel kradvorton.
- Nepre pepu pri #CoFoE ankau en Esperanto.
- Tiam la mondo rimarkas, ke Esperanto taugas jam nun, por transnacie informi kaj paroli pri aferoj, kiel ekz. #CofoE.
- Liston de Tviter-kontoj de estonteckonferencaj plenkunsidanoj oni trovas en https://mallonge.net/tviterocofoe.
- Eltrovu pliajn Tviter-kontojn de estonteckonferencaj plenkunsidanoj kaj petu de Klaus, ke li aldonu tiujn kontojn al jena listo: https://uea.org/v/images/b/b3/Adreslisto_EU-Konferenco.pdf